


Konkludoj kaj resumo

Ĉi tio estas je grandaj trajtoj apliko de la proponita skemo al la morfologia klasifo de vortoj. Kiel ĝenerala averto por la realĝustigo de ĉi tiu klasifo, estas atentenda ke oni devas ne konfuzi formon kun funkcio, ekz.: la vorto »kiam« povas esti aŭ demanda adverbo (**Kiam** vi alvenos?) aŭ subjunkcio (Mi alvenos **kiam** la suno malleviĝos); analoge »multe« povas esti gradigilo (Tiu domo estas **multe** kosta) aŭ adverbo (Li **multe** babilis dum la festo), K.t.p.

Konsiderante kiel lingvajn elementojn: oracion simplan, oracion kompleksan kaj periodon kunmetitan, ni povas situigi la vortspecojn kiel montras la sekvanta sinoptika tabelo.

SINOPTIKA TABELO PRI VORTSPECOJ



Notoj al la Tabelo

- (1) Koincidas kun elementoj de la skemo de oracio.
- (2) Varias laŭ diversaj lingvoj.
- (3) Kompreneble vortspecoj de la krampo » . . . Simplan« povas integri kompleksan oracion.
- (4) Sed integras kunmetitan periodon, kaj kompreneble tiuj vortoj kiuj integras oracion ankaŭ integras periodon.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

341.18 : 378.4 : 408.92

PROBLEMO PRI INTERNACIA LINGVO

en la internacia seminario „Universitato hodiaŭ“

(Bož. Popović, Beograd, Jugoslavio)

Internaciaj ĉiujaraj seminarioj nomitaj „Universitato hodiaŭ“ pritraktas diversajn aktualajn problemojn komunajn al ĉiuj (aŭ almenaŭ al pluraj) universitatoj. Ili okazas en la turisma urbo **Dubrovnik** (Jugoslavio) kaj la lasta — la 13-a — estis de la 1. ĝis la 10. de septembro 1968. La pritraktita temaro arigis ĉirkaŭ du ĉefaj titoloj „Universitato kaj kulturo“ kaj „Problemoj pri universitate edukataj specialistoj en la evoluantaj landoj“.

Kvankam la temaro ne koncernis rekte la problemojn de la internacia lingvo, ili estis tamen tuŝitaj en du artikoloj kaj en la diskutado pri la unua temaro. Unue Prof. **Hamming** (Alta Agrikultura Lernejo, Wageningen, Nederlando) favore menciis Esperanton en la „Enkonduko kaj resumo“ de sia presita referato, ankaŭ dum ĝia prezento antaŭ la partoprenintoj de la seminario. Unu alia referato (Prof. **H. F. Peters** Portland State College, Usono) koncernis rekte la problemon pri internacia lingvo, ĉar ĝia titolo estis „La rolo de lingvo en la demando pri paco“. En lia referato (presita antaŭ la okazigo de la seminario en la aparta numero de la gazeto »Universitato hodiaŭ«) la ĉefaj pensoj estis: 1) la pacperiodoj de la homaro estis samtempe la periodoj kun unu komuna lingvo, 2) la nuna mondo postulas kreon de

unu internacia lingvo; 3) inter la ĝisnunaj projektoj Esperanto havis plej grandan kaj konsiderindan sukceson, pruvinte tiel ke oni povas krei vere internacian lingvon; 4) Esperanto estis kreita pli frue ol la veraj bezonoj postulis ĝin kaj pro tio ĝi ne estas vere tutmonda.

Mi utiligis la eblecon partopreni la seminarion kiel »observanto« kaj dum la diskutado pri la unua temaro mi prenis la parolon. Por la legantoj de Scienca Revuo mi donas plenan tekston de mia parolo. Sed estas tre interesa kaj grava la referato mem, almenaŭ pluraj ĝiaj partoj, precipe pro ĝia neatentinda objektiveco koncerne problemojn pri internacia lingvo (aparte pri Esperanto), ĉar inter neesperantistoj oni renkontas malofte tian objektiveton!). Pro tio mi aldonis ankaŭ la tradukon de kelkaj eltiraĵoj el la referato de Prof. Peters, esperante ke mi faris bonan elekton doni tion kio plej multe interesos niajn legantojn.

La nuna mondo bezonas internacian lingvon

Mi haltus mallonge ĉe la komenca kaj la fina partoj de la referato de Prof. Peters. En la enkonduka parto de la referato li emfazis ke periodoj de la relativa paco en historio de la homaro, la periodoj kiam forestis grandaj militkonfliktoj, estis samtempe la periodoj kiam la tiama homaro havis unu komunan lingvon — »lingua franca«. Estus falo en la puran idealismon, se el tio ni eltirus konkludon ke unu komuna lingvo alportus pacon al la homaro. Sad oni povas eltiri konkludon (kiun el aliaj faktoj eltiras ankaŭ Prof. Peters) ke la angla lingvo ne povas fariĝi universala internacia lingvo, malgraŭ la ĉimomenta tiudirekta evoluo, malgraŭ la elspezado de grandaj financaj rimedoj por penetrado de tiu lingvo. Ĝi povas, sed nur sub unu kondiĉo: ke la anglosaksa raso fariĝu estro de la tuta mondo.

Kiu deziras tion, tiu ne kontraŭstaru la anglo-amerikan lingvan imperialismon. Sed kiu tion ne deziras, tiu serioze pripensu la lingvan problemon en la nuna mondo. Ni ekspektas la pluan historian evoluon en tia direkto ke ĉiuj popoloj iam vivos libere, sen altrudado de fremda volo, sen eniĝado de kies ajn interesoj en la internan vivon de popoloj. Nia erao, kiel diras ankaŭ Prof. Peters, estas vere revolucia kaj diversaj konfliktoj en unuopaj mondpartoj (ja ankaŭ la tutaj grandaj militoj) povas esti konsiderataj kiel ĉeneroj kiuj, tra ĉeno de historiaj eventoj, nepre kondukas al internacia paca kunekzistado, kaj kun tio al pli rapida kreado de la tutmonda, universala, kulturo (pri kiu ĉi tie oni multon parolis). Tia nova mondo gandos ankoraŭ longe siajn naciajn lingvojn, ĝis ja ekzistos nacioj kaj naciaj kulturoj, ĉar lingvo estas kunparto de la kulturo, kiel bone montris unu el la referintoj ĉi tie.

La estonta vivo en la internacia konkordo postulos nepre internacian lingvon, kiu devas esti en akordo kun internacia kulturo, do ĝi devos esti nacie neŭtrala, por povi transportadi ĉion kio estas komuna al la naciaj (aŭ almenaŭ al la mondregionaj) kulturoj kaj helpadi kreadon de la monda kulturo. Sed la homaro jam nun sentas grandan bezonon por neŭtrala internacia lingvo. Tion klare montras ĉiuj internaciaj kunvenoj, ĉar kun unu internacia lingvo ili povus esti multe pli efikaj kaj malpli multekostaj (kio signifas ke oni povas plioftigi ilin per la samaj monrimedoj, per kio same ili fariĝus pli fruktodonaj).

Pro tio mi plene konsentas ankaŭ kun la finkonkludo de Prof. Peters — ke oni devas jam nun nepre iri al la senprokrasta postulo ke oni solvu la problemon pri internacia lingvo. Sciencistoj ne rajtas esti nomataj tiel se ili ne estus rigardantaj en la estonton kaj se ili ne serĉadus la forigadon de malfacilaĵoj barantaj la vojon al pli bona estonto. Tial mi proponas ke la konkludoj de ĉi tiu seminario enhavu la postulon ke UNESKO okupiĝu pri serĉado de efika solvo de la problemo de neŭtrala internacia lingvo.

Problemo de internacia lingvo kaj Esperanto

Kio min persone koncernas, mi estas plene konvinkita ke oni akceptos Esperanton, ĉu plene ĉu kiel bazon por pli bona — vere tutmonda — solvo, tuj kiam oni objektive ekserĉos solvon de la problemo. Mi asentas tion ĉar mi konas bone Esperanton, en ĝi mi publikigis plejparton de miaj sciencaj artikoloj, mi partoprenis kongresojn kie homoj el pli ol 40 landoj (kun pli ol centoj de naciecoj) interparoladis kaj diskutadis sen malfacilaĵoj kaj sen tradukantoj, dum tiuj kongresoj mi faris popularsciencajn prelegojn el astronomio kaj astronautiko kaj kun aŭskultintoj mi diskutis pri multaj demandoj (ankaŭ tiklaj), mi havis seriojn da prelegoj en Pollando kaj Finnlando. Sed mi ne deziras misuzi ĉi tiun tribunon por propagandi Esperanton; mi nur deziras ankoraŭ emfazi ke Prof. Peters objektive prezentis, en la presita referato, faktojn pri Esperanto. Mi substrekas tion ĉar plurfoje mi havis la okazon aŭdi ke iuj sciencistoj apriore anatemis Esperanton. kompreneble plene nesience; oni ne povas krei sian vidpunkton pri io ajn kion oni ne konas, sed oni devas unue ekkoni ĝin kaj post tio paroli pri ĝi.

Mi konsentas ankaŭ kun la rimarko ke Esperanto ne baziĝas sur ĉiujn lingvajn grupojn en la mondo, sed ĉefe sur okcidenteŭropajn lingvojn. Fakte la bazo de Esperanto estas la hindoeŭropaj lingvoj, sed

la rolon de la slavaj lingvoj en ĝi oni ne vidas antaŭ ol oni kontaktiĝas kun ĝi pli profunde. Kaj malgraŭ tio ke aliaj lingvaj grupoj, ekz. de Malproksima Oriento, ne partoprenis la kreadon de Esperanto, oni akceptas ĝin tie eĉ pli volonte ol en Eŭropo, ĉar kiel logika lingvo ĝi estas por ili pli facila ol eŭropaj lingvoj. Tiel Ĉinio grandmezure utiligas Esperanton por politika propagando, per eldonaĵoj dissendataj grandparte ankaŭ senpage. Kaj la Socialista Partio de Japanio antaŭvidis en sia programo enkondukon de Esperanto en la lernejojn, sub influo de sufiĉe vasta agnosko de Esperanto ĝuste en sciencaj rondoj.

Tion ĉion konscias ankaŭ seriozaj esperantistoj — mi flankenmetas sektemulojn. Pro tio ja unu el la universalaj Esperanto-kongresoj akceptis rezolucion ke oni konsentos kun science **fundotaj** ŝanĝoj en Esperanto, por konsideri ankaŭ aliajn lingvogrupojn, post kiam Esperanto estos oficiale agnoskita kiel bazo por kreo de internacia oficiala lingvo. Kaj antaŭ tio ĝi jam ludas sian kulturalan rolon, tian kian ĝin prezentis Prof. Peters, kvankam li mem ne estas esperantisto.

Kelkaj partoj el la referato de Prof. Peters

Dudeka Jarcento estas nomita la jarcento de milito kaj de paco, kun milito dominanta la unuan duonon kaj serĉado de paco dominantanta la duan duonon. En ĝi troviĝas serĉadproceso, ne aserto ke oni trovos pacon.

Tri periodoj kiam mankis grandaj konfliktoj havis ankaŭ tri komunajn ecojn: ili baziĝis je centra aŭtoritato, komuna leĝdonanto kaj la universala lingvo. »Pax Romana« restadis sur la militpovo de Romo, »Pax Ecclesia« sur la spirita aŭtoritato de Papo kaj »Pax Britanica« sur la supereco de la Floto de Britujo. En ĉiuj tri kazoj la povo de la centra aŭtoritato estis subtenata per leĝoj kaj per lingvo. La latina estis »lingua franca« por la Roma Imperio kaj por la Roma Eklezio, la angla por la Brita Imperio. En ĉiu kazo la ĉefa elemento estis povo. Tio metas la demandon: ĉu la mondpaco povas esti atingota per pacrimedoj aŭ ĝi devas esti altrudata per forto?....

La neceso por internacia lingvo kiel rimedo por kontaktoj en internaciaj komerco, trafiko, diplomatio, edukado, estis ofte konstatita, sed neniam la neceso estis tiom granda kiom nun. Kun la komunikadatelitoj ĉirkaŭ la Tero, transportantaj trans ĉiuj oceanoj kaj kontinentoj elektronajn simbolojn, kiujn povas kapti la popoloj de la tuta mondo sed kompreni ilin nur tiuj kiuj scipovas paroli la elsendolingvon

— la lingvistika anarĥio fariĝas forte elstara. Same ĝi estas elstara en debatoj en U.N., kie kvin lingvoj — angla, franca, hispana, rusa kaj ĉina — estas oficiale uzataj. La penoj necesaj por traduki ĉiun parolon faritan en U.N. simultane en kvar lingvojn estas negravaj, diru nenio, rilate al la elspezoj por publikigi kvin versiojn de ĉiu dokumento.....

.... Kiel sekvo, plej multaj homoj povas en la publika vivo kompreni kaj paroli la anglan. La samo estas ĉe sciencistoj, inĝenieroj kaj teknikistoj, al kiuj estas necesa la angla pro profesiaj kialoj. Eĉ pli, amerikaj frazoj, esprimoj kaj mallongigoj daŭre penetradas fremdajn lingvojn — je multaj ĉagrenoj de puristoj — kiel sekvo de mondlargaj aktivecoj de usonaj korporacioj, investaj trustoj, turistoj kaj usonaj larg'armeaj kaj civilaj institucioj en eksterlando. Amerikanigo de la mondo — cinikoj nomigis ĝin »kokakoloniigo« — estas sendube granda forto en la dua duono de la dudeka jarcento, senkonsidere sentojn kun kiuj ĝi estas renkontata en multaj mondregionoj.

Kaj jen la demando ĉu la angla fariĝos universale agnoskita instrumento por internaciaj diskutoj estas neniel solvita. Kontraŭe, konkurence kun la tendenco al la angla lingvo, estas notebla forta kontraŭkurento, eĉ »revolto kontraŭ la angla«, kaŭzita parte per rapida disigado de la brita imperio kaj per universala seniluziigo kun usona regado..... konstanta malkontento de france parolantaj kanadanoj.... en Hindujo plurfojaj largaj studentaj demonstracioj kontraŭ la uzado de la angla..... en Orienta Afriko Sŭahili komencas anstataŭigi la anglan; landoj de Latinameriko premas al pli granda uzado de la hispana. Tiuj ĉi kaj multaj aliaj ventofluoj montras al la ĝenerala rifuzado de imperialismo en kiu ajn formo, inklude la lingvan imperialismon.....

Ŝajnas ke neevitebla estas la konkludo ke pro psikologiaj kialoj neniu el la ekzistantaj naciaj dialektoj povos esti levigita al la stato de vera mondlingvo.....

La plej konata el multaj konstruitaj lingvoj surbaze de la principo **a posteriori**, kombinanta elementojn de la vortaroj kaj gramatikoj de la ekzistantaj lingvoj, estas Esperanto....

Esperanto baziĝas je du postuloj: unue ke la lingvo ne estu ŝarĝita per komplikaj sistemoj de deklinacioj kaj konjugacioj kaj due ke saĝa elekto de prefiksoj kaj sufiksoj povas multe malampleksigi la vortaron. La tria postulo — la sekvo de la kulturaj bazo kaj inklino de Zamenhof — estas ke internacia lingvo devas havi radikojn en la grandaj lingvoj de Okcidento. Pro tio Esperanto enkorpiĝas elementojn de latina, romanaj kaj germanaj lingvoj, sed larĝe neglektas slavajn lingvojn kaj neniel konsideras lingvojn de la Oriento.....

Tamen, Esperanto havis kaj havas konsiderindan apogon ankaŭ de popoloj kies lingvojn Zamenhof ne atentis. Tolstoj, ekzemple, instigadis ĉiujn lerni Esperanton kaj ekzistas fervoraj adeptoj de ĉi tiu »Lingvo Internacia« en Japanio, Hindujo, Mezoriento kaj Latinameriko, ne menciante multnombrajn Esperanto-societojn, ligojn kaj asociojn en Eŭropo kaj Nordameriko. Oni instruis Esperanton en Unuiĝintaj Nacioj kaj oni elsendas en ĝi trans Voĉo de Ameriko. Ĝia vortaro havas siajn 80.000 vortojn kaj ĝia literaturo, originala kaj tradukita, enhavas pli ol 50.000 volumojn. Tio estas impona sukceso; ĝi estas ja ankoraŭ pli impona se oni kalkulas la fakton ke, aldone al ĉi tiu abundo de skribaj dokumentoj, Esperanto plejsukcese servis kiel parolata lingvo ĉe internaciaj kunvenegoj, depost 1905 kiam la unua Kongreso okazis en Boulogne-sur-Mer.

La historio de la Esperanto-movado forigas la argumentojn de tiuj kiuj asertas ke neniu artefarita lingvo iam ajn povos fariĝi anskrita **lingua franca**.....

La lasta punkto (temas pri la aserto »la tempo ne estis matura por internacia lingvo — Rim. de B.P.), la plej grava de ĉiuj, postulas iom da pritrakto. Estas memkomprenebla ke la mondo ne bezonis universalan lingvon en la tempo kiam plej multaj popoloj vivis en izoleco, kiam trafiko estis malriĉa kaj kontaktoj malfacilaj..... Per alveno de radio, televido, raketa tekniko, atomenergio kaj kontaktsatelitoj, teĥnologia unuiĝado de la terĝlobo estas finita kaj la bezono por internacia lingvo aperis kiel imperativo. Antaŭ kvindek jaroj universala lingvo estus plene uzebla rimedo por nemultaj, hodiaŭ ĝi estus riĉaĵo por multaj, morgaŭ ĝi koncernos ĉiujn.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

413.164:91

NA GEOGRAFIA TERMINARO

(A. Albault, Toulouse, Francio)*

Nia gazetaro jam publicis kutimajn recenzetojn pri tiu multkolora mondmapo ellaborita laŭ skalo 1/42 000 000 sur folio 70 x 100 cm. kaj reproduktita de la institucio »Geokarta« (Beograd, 1968); ĝin eldonis la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. Bele prezentita ĝi indas ornami la murojn de niaj oficejoj kaj bibliotekoj.

Sed multe pli ol simpla mapo, tiu laboro estas por ni, antaŭ ĉio, baza geografia terminaro: kiel tia ĝi ankaŭ meritas recenzon; recenzon des pli severan, ke de la taŭgeco de tiu unua provo povas dependi nia tuta estonta geografia terminaro! Tion ni intencas fari en la sekvantaj linioj, tiel ke ŝtopiĝu tro evidenta breĉo en nia recenza literaturo.

*

* * *

Nu! Tiu baza terminaro konsistas el 850 nomoj de fizika kaj politika geografioj. Ĝi estis redaktita de Lic. Tibor Sekelj laŭ la decidoj de la »Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj nomoj«. Tiuj decidoj estas la frukto de 8-jara laboro de la nomita Komisiono.

*) 32 Av. Etienne Billières, Toulouse